Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)
La 5-a Virtuala Kongreso de Esperanto • 28 novembro – 1 decembro

# La Flamo de Esperanto

1-a de decembro 2024, numero 5
Redaktas Dmitrij Ŝevĉenko kaj Anna Striganova

## La Fermo de la 5-a VK

Preskaŭ finiĝis la 5-a VK, sekvas ankoraŭ kelkaj ViMF kaj Babilĉambroj, sed finsonis jam la himno ferma.

**Ni atentigas, ke ĉiujn registritajn prelegojn vi povos re-spekti ĝis la fino de la jaro. Vi povas ankaŭ uzi "Koridoron" kaj "Kafejon" por babili.**

La Fermon la Vic-prezidanto de UEA Fernando Maia komencis de la statistiko:

- ★ Dum la 5-a VK okazis ĉirkaŭ 200 programeroj;
- ★ Ĉirkaŭ cent "budoj" dum la Virtuala Movada Foiro;
- ★ Ĉirkaŭ cent eroj de la kerna programo;
- ★ 96 horojn seninterrompe daŭris la programo.

Fernando atentigis pri la plej gravaj eroj de la VK. Unuavice li menciis la eblon iom sperti etoson de la unua UK en Afriko por tiuj, kiuj ne povis ĝin partopreni. Kun granda fiero Fernando rakontis pri partopreno de la Julián Hernández Angulo, kiu okazis dank' al zorgo de Rogener Pavinski, eks-redaktoro de la revuo *Kontakto*, kiu nun tre multe kunlaboras kun UEA.

Okazis multaj gravaj omaĝoj:

- ★ Al William Auld kaj Marjorie Boulton;
- ★ Al Klara Zamenhof;
- ★ Al István Nemere, antaŭnelonge forpasinta;
- ★ Al la libro *Esperanto en Perspektivo*, aperinta antaŭ 50 jaroj




Fernando refoje dankis ĉiujn Esperantajn organizojn kaj aktivulojn, sen kiuj la tiom sukcesa 5-a VK ne povus realiĝi.

Poste Amri Wandel rakontis pri la scienca kaj faka agado dum la VK; detalojn pri ĝi vi povas legi en kelkaj antaŭaj numeroj de *La Flamo de Esperanto*. Amri dankis ĉiujn prelegantojn de la IKU, 7 el kiuj reproduktis siajn prelegojn de Aruŝo por prezenti ilin al la partoprenantoj de la VK. Amri dankis TEJO-n, kiu riĉigis la programon per KonSciU (legu detalojn en *La Flamo de Esperanto*, n-ro 3). La rezultojn vidu sur la paĝo 4. Ankaŭ Amri menciis la Fakan Forumon (detaloj en *La Flamo de Esperanto*, n-ro 4) kaj ViMF-ojn.

Poste Petro Baláž dankis ĉiujn kontribuantojn, partoprenatojn, kiuj aktive vizitis la aranĝojn, kaj sen kies aktiveco la tuto estus sencela. Kaj certe li dankis la teamon de E@I, kiu senlace faris la VK komforta por ĉiuj partoprenantoj. Petro ankaŭ anoncis ke la kvinan lokon laŭ la kvanto de la partoprenantoj okupis ĉi -VK-e... Burundo! Tio montras, ke la Unua Afrika kongreso forte influis la evoluon de la Afrika Esperanto-movado.



La lastajn vortojn de la fermo diris Fernando, li diris ke la VK, certe, estas nur ŝtupo kaj la sekvaj ŝtupoj dependas de ni ĉiuj. Li invitis la homojn viziti la UK-on en Brno (Burno), la inviton postsekvis filmeto pri la urbo kaj ĝiaj ĉirkaŭaĵoj. Poste sekvis la himno, nur muziko, sen vortoj, por, kiel diris Fernando, dum ĝi sonas, ni povu pli profunde pensi pri nia afero, por ke ĝi vere flamu en niaj koroj.

# Indonezia Esperanto-Asocio

Hodiaŭ, kadre de ViMF, prezentis sin Indonezia Esperanto-Asocio (IEA). La ĉefan parton de la prezento gvidis Ilia Sumilfia Dewi, la prezidanto de IEA. Ŝi plejparte rakontis pri la agado kaj atingoj de la organizo dum la jam preskaŭ pasinta jaro 2024.

La organizo nun havas sian sidejon en la ĉefurbo Ĝakarto. La aktualaj celoj de la organizo estas plimultigi la membrojn, organizi klubojn en diversaj urboj de la lando, komuniki kaj kunlabori kun eksterlandaj organizoj. Unu el la plej rimarkindaj fruktoj de tiu laboro estas la Trilanda Esperanto-Kongreso, fare de Aŭstralia, Novzelanda kaj Indonezia Esperanto-Asocioj.

Tre gravan rolon en la movado nun ludas regulaj virtualaj agadoj, kursoj, renkontiĝoj, ĉar pro la vasteco de la lando ne ĉiam facilas renkontigi la esperantistojn en unu loko. La organizo zorgas ankaŭ, ke la junaj esperantistoj povu viziti internaciajn Esperanto-aranĝojn.

El la celoj realigitaj ĉijare aparte menciindas:



★ Estis restarigita kaj revivigita la klubo en la urbo Jogjakarto, kiu kunvenigas la homojn, kiuj iam lernis Esperanton aŭ lernas ĝin nun. Dume la klubo ne estas granda, sed funkcias.

★ IEA partoprenis la eventon de la ministerio pri junuloj kaj sportoj, kadre de kiu eblis reklami per starigo de bildo, okazigi enkondukan kurson kaj sur scenejo rakonti pri Esperanto al multnombra juna ekstera publiko. Laŭ la rakonto de Ilia, multaj homoj interesiĝis kaj plezure demandis la elpaŝantojn. La demandoj estis tradiciaj: kio estas Esperanto, kiu parolas ĝin ktp. La celoj de la partopreno estis reklami, varbi novajn membrojn, iomete instrui al novuloj.




★ Estis renovigita (dume la renovigo ankoraŭ daŭras) la retpaĝo de la organizo: https://www.esperanto.or.id

★ IEA festis sian 11-jariĝon virtuale, ĉeestis multaj esperantistoj el diversaj landoj. Dum kvar horoj okazis diversaj programeroj: prelegoj, ludoj, kantoj, lego-salonoj.

★ Du membroj de la asocio partoprenis la 3-an Komunan Kongreson de Japanio kaj Koreio, dank' al zorgo de JEI kaj KEA, kiuj subvenciis la partoprenantojn el Indonezio. La reprezentantoj prelegis pri la movado en la lando kaj pri la IJK, kiun Indonezio akceptos en la 2025-a jaro.

★ Daŭras la laboro de la verkklubo "Ruĝa plumo", kreita en 2022-a jaro, fondita de Ilia kaj Midori Mamija el Japanio. Kunvenoj de la grupo okazas unufoje monate per Zoom, la celo estas kolekti aziajn esperantistojn, kiuj okupiĝas pri verkado, aranĝi verksesiojn kaj subteni laboron de la Internacia Novela Konkurso (INK).

Ilia invitas ĉiujn viziti Ĝakarton kaj estos ĝoja akompani gastojn kaj montri vidindaĵojn de la urbo kaj ĝiaj ĉirkaŭaĵoj.

Por subteni la organizon vi ankaŭ povas spekti, komenti kaj certe ŝati la Jutub-kanalon ESPERANTO INDONESIA, kie eblas trovi registraĵojn de diversaj aranĝoj

Se vi volas finance subteni la organizon vi povas uzi la UEA-konton iesa-p.


* * *

La oficialan prelegon postsekvis bele ilustrita rakonto pri la Esperanto-klubo de la urbo Bandung, preparita de Adam Damario Prakasa. La sidejo de la klubo troviĝas en la impona konstruaĵo de la muzeo de l' Konferenco Azia Afrika, kiu gastigas kelkajn lingvajn klubojn. La klubo estas tre aktiva pri reklamado kaj eldonado de libroj, bildkartoj ktp.



# La Estraro de UEA respondis

Sabate, la 30-an de novembro 2024, je la 12:00 UTC, ĉiuj dezirantoj el tiuj, kiuj aliĝis al la 5-a Virtuala Kongreso, povis fari demandojn al la Estraro de UEA.




La programero okazis realtempe en Zoom-ĉambro. Dum la ĉefa tempo ĉeestis samtempe de 60 ĝis 85 partoprenantoj, kiuj reprezentis dekojn da landoj. Tre reprezenta statistiko, ĉu ne? Necesas aparte konsideri, ke ĉiuj individuaj membroj de UEA povas aliĝi al la Virtuala Kongreso tute senpage. Kaj ankaŭ ke ajna aliĝinto (ankaŭ ne membroj de UEA) povis fari iujn ajn demandojn al la Estraro, ni povas paroli pri la plej malfermita dialogo inter UEA kaj esperantistoj, kiam estraranoj apenaŭ povus "fuĝi", kaj devis respondi al ĉiuj demandoj, sendepende, ĉu ili estas ordinaraj aŭ tiklaj kaj defiaj. Do, kiu deziris, tiu venis kaj demandis.

La kunvenon salutis kaj kurte enkondukis Duncan Charters, la Prezidanto de UEA.

Daŭrigis Fernando Maia, la Vicprezidanto de UEA, per la resumo de la aktuala Estrara raporto (tiu de 2023).

Kaj poste oni invitis publikon fari la demandojn. Ili estis sufiĉe multaj kaj rilatis preskaŭ al ĉiuj kampoj de la agado de UEA.

***Kiu agado estas la plej grava? Kiel oni decidas kio estas pli grava kaj kio malpli?*** – tiusencaj demandoj komencis la duflankan komunikadon inter la Estraro kaj la partoprenantoj.

Duncan Charters respondis, ke estas granda defio, sed helpas la Strategia Planado, kie estas menciataj la plej gravaj kampoj. Inter ili, ekzemple, estas Informado kaj Komunikado (parto de KIRI, kiu formas la kvar ĉefajn agadkampojn de UEA).

Certe ekzistas multaj farendaj aferoj. Estas granda novaĵo kaj avantaĝo, ke nun ĉiu membro de UEA povas aliĝi al la agado, rilate la Informadon, proponi sian volontulan partoprenon en la speciala nun formata laborgrupo. Laŭ Duncan Charters tio lasas al la membroj de UEA decidi pri tio kion fari, rilate la Informadon, kion prioritatigi kaj pri kio male – zorgi malpli.

***Kio okazas pri AKSO? Pri la retejo de UEA?*** – certe aperis ankaŭ tiaj demandoj, ĉar la membroj de UEA tre scivolas pri la evoluo de la aferoj rilataj al tio.

Duncan Charters respondis, ke ĉefe, kiel oni povis legi en la aktuala numero de la revuo *Esperanto*, UEA momente serĉas programiston, kiu akompanos la tutan projekton. Nun okazas granda progreso ĉi-rilate. La rezulto nepre estos la funkcianta reta sistemo de UEA. Kompreneble, tio okupos iom da tempo.

Intertempe indas aldoni, ke en la decembra numero de la revuo *Esperanto* aperas la unua parto de la longa konversacio de la redakcio kun Duncan Charters, kie ankaŭ estas levitaj demandoj, kiuj rilatas al AKSO kaj la retaj aferoj de UEA ĝenerale. La dua parto de la konversacio aperos en la januara numero.

***Ĉu reaperos presita Jarlibro? Ja ne ĉiuj povas aŭ emas uzi komputilon.*** – La alia temo, kiu interesas konsiderindan parton de la membraro.

La resuma respondo de la Estraro estis: oni eldonos *Almanakon de UEA* anstataŭ la ĉiujara papera *Jarlibro*. Tio estas unu el la nunaj prioritataj taskoj. Estas komisiito pri ĝi. Tamen oni atentu kaj konsideru kelkajn leĝajn nuancojn: pro la novaj reguloj oni ne povas nuntempe aperigi ĉiujn datumojn pri ĉiuj. Do, eventuale, la informoj de la Deligita Reto aperos malsame, ol iam aperis en la papera *Jarlibro*.

Estis multaj demandoj, kritikoj kaj proponoj pri la ***nova (relative nova, ĉar ĝi jam estas aplikata de jaroj) kotizsistemo de UEA.***

Fernando Maia emfazis, ke malaltaj kotizoj por Afrikaj landoj konvinkas afrikanojn aliĝi mem.

UEA deziras strategie ŝanĝi la ĝeneralan kulturon, rilate la aliĝojn de la afrikaj esperantistoj kaj ne nur.

Antaŭe tiuj aliĝoj venis nur pere de subvencioj kaj specialaj fondaĵoj. Nun jam multaj afrikanoj mem pagas la kotizojn, kaj konstante la kvanto de tiaj membroj kreskas. Ĉefe tion stimulas la malaltaj kotizoj por ili. Kompreneble, tiavoja membriĝo estas multe pli dezirinda, ĉar la homo faras pli pripensitan decidon pri la aliĝo.

Laŭ la informo de Fernando Maia, la membraro en multaj landoj kreskis pro tiu ĉi reformo. I.a. TEJO superis 1000 membrojn. Ĉiuj membroj de TEJO estas samtempe junaj membroj de UEA, kio signife "junigas" la Asocion.

Sed de la alia flanko – por kelkaj landoj la kotizoj altiĝis. Jes, foje tio estas problemo, ekzemple, por pensiuloj ktp. Ekzistas tamen la antaŭviditaj solvoj por tiu ĉi problemo. Inter ili (krom, ekzemple, senpaga membriĝo per la fondaĵo Canuto), la Ĝenerala Direktoro

povas en individuaj kazoj konsideri kaj apliki malpli altajn kotizojn, laŭ la situacio. La membraro ne falas draste tamen pro la altigo. Gravas, ke ĉiam restu spaco por agado aktiva kaj kreema. UEA estu laŭeble maksimume fleksebla. Kaj ĉiam estas la defio reteni la membrojn kaj akiri novajn. Sed konsiderindas, ke tiu ĉi defio estas en la moderna mondo ne nur por UEA, sed por preskaŭ ajna alia asocio.

La demandoj tuŝis ankaŭ la kotizojn por la UK. ***Ĉu ili estas tro altaj? Kaj kion fari al la homoj el la landoj, en kiuj oni apenaŭ povas pagi la vojaĝon al la kongreso?***

Aparta kritiko venis el Nepalo, kie estas multaj esperantistoj, kiuj dezirus partopreni UK-ojn, sed ne povas pro manko de tiom da mono.

La Estraro komunikis, ke la kotizoj por la Universalaj Kongresoj fakte estas relative malaltaj kompare kun la kotizoj de la aliaj, neesperantistaj aranĝoj.

Tamen ekzistas fondusoj, kiuj helpas esperantistojn, kiuj ne povas veni al la UK pro la financaj kialoj. Sed, kompreneble, tio ne estas centprocenta solvo, ĉar tio ne sufiĉas por venigi ĉiujn.

Ni devas trovi ekvilibron. Landaj Asocioj kontaktu UEA por trovi solvojn.

Bona alternativo estas la Virtuala Kongreso. Ĝi taŭgas ne nur por tiuj, kiuj ne povas veni pro financaj problemoj, sed ankaŭ pro aliaj cirkonstancoj.

Fernando Maia kaj la aliaj estraranoj agnoskis la bonan laboron de la nuna Kongresa Fako.

Oni parolis ankaŭ pri la Afrika Kongreso (temas ne pri la unua Afrika UK, sed pri la aparta regiona aranĝo, kiu okazas en la Afrika kontinento). Estis esprimita espero, ke ĝi pli ofte okazu. La 109-a Universala Kongreso en Aruŝo, Tanzanio, stimulis la Esperanto-movadon en Afriko. Kaj, kiel diris Duncan Charters, UEA devis eksterordinare multe elspezi por ĝi, ekzemple el la Afrika Fondaĵo.

Tamen UEA kaj partneroj serĉos solvojn por Afrikaj Kongresoj de Esperanto okazu ankaŭ estonte.

Iom eksterteme oni menciis la Bankedon de la 109-a UK. Tio estis vere unika sperto por tiu ĉi aranĝo. Ĉi-foje ĝi estis por ĉiuj kongresanoj tute senpaga. Sed volontule oni, jes ja, povis kontribui iun sumon, se oni povis/deziris.

Aparta diskuto okazis pro la ĵusa novaĵo pri la ŝanĝo de la datoj de la 110-a UK, kiu okazos en 2025 en Ĉeĥio (vidu komunikon en la antaŭa numero de *La Flamo de Esperanto*).

Tio estas granda defio kaj kompreneble grava novaĵo. Tio estas ankaŭ defio por TEJO. Pri tio parolis Albert Stalin Garrido, eksa prezidanto de TEJO kaj nuntempa Esperanto-aktivulo. Unuavice, ĉar oni ja devas iel iri ankaŭ al la IJK en Indonezio – ja estas konsiderinda kvanto da partoprenantoj de la UK, kiuj tion ankaŭ planas.

Albert Stalin Garrido diris, ke eble estu diskutite, ke la IJK ankaŭ estos movita. Tio povus esti pozitiva afero por ambaŭ kongresoj. Tio ankaŭ rilatas ILEI-Kongreson kaj aliajn renkontiĝojn.

Li krome demandis, ĉu iu el la Estraro de UEA interesiĝas iri al Indonezia IJK?

Almenaŭ Fernando Maia respondis, ke tio interesas lin.

So Jinsu, estrarano de UEA, emfazis, ke li tre ŝatas la novaĵon, ke la IJK okazos en Azio ĉi-foje. Kaj tio estas grava sukceso por la Azia Esperanto-movado.

La estraranino Arko (Gong Xiaofeng) komunikis, ke progresas la Virina Agado. Post 2 jaroj da laboro oni restarigis la Virinan Komision de UEA. Krome okazis Virina Kongreso en Aruŝo antaŭ la 109-a UK. Kaj ankaŭ dum la UK mem oni parolis kiel kuraĝigi virinojn aliĝi al la Esperanto-movado.

Kaj ankaŭ en aliaj kongresoj daŭris la Virina Agado, i.a. dum la Itala Kongreso kaj la aliaj. Estas ankoraŭ multaj projektoj. Kaj dum la venonta UK kaj ILEI-kongreso aktivos Virina Komisiono.

Aleks Kadar, la Ĝenerala Sekretario, anoncis, ke 2025 estos elektojaro. Do, se estas interesatoj, kiuj havas la deziron esti elektitaj al la nova Estraro, bv. jam baldaŭ montri vin!

Amri Wandel, Vicprezidanto de UEA, diris, ke tio estas agrabla por li mandato kaj ke li ĝuas modelan kunlaboron en la Estraro! "Ni helpas unu la alian! Dankon al la Estraro." – substrekis li.

La kunsido pasis en tre amika kaj samtempe afera etoso. Ĉiuj ricevis elĉerpajn respondojn al la demandoj kaj la Estraro de UEA ricevis novajn ideojn kaj taskojn por evoluo de la Asocio.

## La rezultoj de KonSciU

**La unuan lokon** okupis Xīnyuán (Svislando) kun la temo "Antaŭvidi sunradiadon kun nubaj fotoj kaj AI" (69 poentoj).

**La duan lokon** okupis Vittorio (Italio) kun la temo "Instruado de kvantuma fiziko ĉe lernejoj" (69 poentoj). La kvanto de poentoj estas la sama, sed la partoprenanto trapasis iomete la templinion.

**La trian lokon** okupis Gabriele (Nederlando) kun la temo "La rolo de Esperanto en solvado de Profundaj Malkonsentoj" (63 poentoj).

**Estis aljuĝitaj ankaŭ du Honoraj Mencioj:**

Al Patricio (Argentino, 62 poentoj) kun la temo "Ĉifroekonomio kaj bankrotoj" kaj al Hana (Bolivio, 42 poentoj) kun la temo "Kiel interne, tiel ekstere", ŝi estas junulino nur 17-jaraĝa, sed ŝia elpaŝo tre plaĉis al la publiko kaj al la ĵurio.